



Kulturaj Kajeroj

É. MATHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Simpla : 3 fkoj

Subtena : 5 fkoj

Bonfara : 10 fkoj

Sendotaj al : Micard Henri

Kulturaj kajeroj

Épineux-le-Seguin (Mayenne)

C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagó 4)

MARTO - APRILO

1962

2

KULTURAJ KAJEROJ

1962

Marto - Aprilo

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

..

El la kulturdomo.

Jubilea Jaro (P. Babin).

Esperanto tra la mondo.

Turismo :

Vojaĝo tra Provenco (VI), Aix-en-Provence.
(F. Garrigue).

Intervjuo :

Kelkaj minutoj kun Dro P. Neergaard.

Nekredebla malkovro :

La Venusaj Pordoj.

La tri vizaĝoj de « France ».

El ie en la mondo :

Milito kontraŭ analfabeteco en Kubo.
(Raŭl Juarez Sedenio).

Sportoj :

La Bazbalo.

Fantaziaĵoj :

La valoro de unu groŝo
(Zsigmond Remenyik, trad. de P. Balkanyi).

Por via distro :

Nia konkurso.

Cerbumu.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « Kulturaj Kajeroj » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

Jubilea Jaro

Antaŭ dek jaroj, post longaj kaj malfacilaj klopodadoj, post sinsekvo de esperoj kaj malesperoj dank'al grupeto de samideanoj, ĉefe dank'al la granda sindonemo kaj senlaca laboro de la prezidanto Sro Micard, la Asocio kooperativa tiucele fondita sukcesis akiri la bienon Grésillon. Tio estis la ekirpunkto de novaj klopodoj, de novaj zorgoj por la administrantoj ĉar la problemoj estis jenaj : mebligi grandegan domon, ekipi ĉambrojn per kuranta akvo kaj elektra kurento, organizi aktivajn taŭgajn por altiri, interesi, instigi al reveno la unuajn vizitantojn. Kaj tio estis fareda nur per la sindonemo de geamikoj, ĉar post la aĉetado de la bieno, mankis la mono. Mankas la mecenatoj en Esperantujo, kaj kiam oni ŝatas sendependecon oni ne povas trovi helpon ekster la esperantistaro.

Dek jaroj ! Tempo fakte mallonga, sed vojo longa ! Jes la vojo estas longa, kiam oni vidas la celon trafotan, kiam la neatenditaj malhelpoj estas multaj, kiuj ne permesas laŭdezire iri. Preskaŭ ĉiu paŝo estas venko. Pensu pri tiuj, kiuj konstruis la piramidojn, la katedralojn. Ili ne disponis la modernajn helpilojn kiuj malpezigas la homan laboron. Tiaj konstruadoj estis eblaj dank'al kredo kaj nombro. Nu, kredo en la valoro de Esperanto, fido al la estonto ne mankas al la Kulturdomestroj sed mankas la nombro de laborantoj.

Sed malgraŭ tio ne sufiĉa nombro de la kunlaborantoj ni estas certaj ke la gesamideanoj kiuj vizitis Grésillon antaŭ dek jaroj, miros se ili revenos ĉi tiun jaron. Jes, la vojo estis malglata ; jes, la nombro estas ne sufiĉa ; jes, la proponitajn celojn oni ankoraŭ ne tute atingis. Sed memoru. Antaŭ dek jaroj ĉiu partoprenanto estis devigata kunporti siajn littukojn kaj kovrilojn ; la plej granda parto el la mebloj estis prun-

tita de amikoj, la akvo, la elektro estis apenaŭ sufiĉe disdonataj ; la ĉambroj estis plejparte en malbona stato ; la akvo estis flava ; ne ekzistis la banejo nek la infangardeno ; la servistaro konsistis ĉefe el la partoprenantoj mem ; la kulturaj aranĝoj ne estis tre multaj nek tre taŭgaj. Nun la restadantoj ĝuas sufiĉan komforton (ni ĉiam substrekas ke Grésillon ne estas « hotelo »). La spertoj permesis la regulan aranĝon de aro de aktivaj, kiuj ĉiam renkontas sukceson. Kaj tion faris nur grupo, eĉ grupeto de aktivuloj per mono enspezita dum ne multe pli ol du monata funkciado kaj malgraŭ elspertoj ĉiujare pligrandigantaj.

Kompreneble la administrantoj ne deziras ke oni plektu por ili kronojn. Ili ne laboras por ricevi honorojn aŭ gratulojn. Ili nur pensas, ke per tiu laboro ili bone servas al Esperanto kaj per Esperanto al kulturo, al interkomprenemo de la homoj. Ili nur deziras ke oni helpu ilin. Ne ekzistas la mecenatoj en la esperanta movado ? Ne gravas. Sufiĉas, ke ekzistas homoj konsciaj pri la vera senco de « movado ». Ĉu rajtas sin nomi ano de la esperantista movado, tiu, kiu nur legas revuojn kaj korespondas ? Tiu kiu nur lernas Esperanton kaj ne uzas ĝin cele al sin plibonigo aŭ plibonigo de la interhomaj rilatoj ? Grésillon bezonas la helpon de la esperantistaj « movadantoj ». Ĉiu havas ion por « doni » ; ne nur monon, sed laboron aŭ ĉeeston. Ĉeesto estas ne nur kuraĝiga sed ankaŭ helpa. Per via ĉeesto vi alportos al la Grésillon-estroj vian aprobon pri ilia laboro kaj al la aliaj ĉeestantoj viajn riĉaĵojn : viajn spertojn, viajn lingvo-konojn, aŭ tute simple tiun senegalan riĉaĵon : amikecon.

P. BABIN.

Esperanto tra la Mondo



La honora komitato por la Universala Kongreso

La dana ĉefministro Viggo Kampmann transprenis la protektantecon super la 47-a Universala Kongreso, en Kopenhago.

Eniris interalie la Honoran Komitaton ministroj, unuarangaj eminentuloj, ekz. Prof. Dro. Niels Bohr, Nobelpremiito pri fiziko.

La oratora konkurso

Ĝejnuloj ĝis 28 jaraj rajtos partopreni la oratoran konkurson de la Universala Kongreso. Vidu la regularon en « Esperanto » de februaro.

1963 : Kongreso en Sofia

La estraro de U.E.A. akceptis la inviton de Sofia okazigi la universalan kongreson en 1963.

I.F.E.F. Kongreso 1962

La kongreso de la Internacia Federacio de la Esperantistaj Fervojistoj okazos en Budapeŝto (5-11 majo). Krom la diversaj fakprelegoj kaj laborkunidoj okazos ekskursoj (el kiuj unu per aeroplano). En 1963, la kongreso okazos en Stoke-on-trent (Britujo). Informoj : Franca Fervojista Esperanto-Asocio, 11, rue de Milan, Paris (9^e).

La esperanta ferivilaĝo Primoŝten ĉe Adriatika Maro (Jugoslavio)

La kampadejo « Esperantujo » situas apud Primoŝten, je 33 km. de Ŝibenik, en rava loko, meze de pinarboj, je kelkaj paŝoj de la strando. Ĉirkaŭ la esperanto-restoracio, la tendoj estas bonege meblitaj (oni ankaŭ povas loĝi en domo, en Primoŝten).

La prezo de la tagpensiono estas tre malalta. Petu informojn al : Internacia Esperanto-kampadejo, Primoŝten, ĉe Ŝibenik, Jugoslavio.

Pensu jam pri la skiferio de TEJO !

Ĝi okazos fine de la jaro en Saalbach (apud Zell-am-See), en Aŭstrujo. Respondeculo : Heinrich Reiter, Van der Nüllgasse 100/10/15, Wien, Aŭstrujo.

Esperanto-Domo en Romo

Esperanto-domo nun funkcias en Romo, ĉiuvespere de la 18-a ĝis la 22-a, via del Boccario 5.

Asocio de ornitologoj

Starigis iniciata komitato por esperantlingva rondo de ornitologoj. Aniĝos ĉiuj esperantistoj kiuj havas intereson pri birdoj en la plej ĝenerala senco : bredado, studado, kaptado, ktp

Skribu al H. Tiepermann, De Burburestraat 28, Antwerpen, Belgujo.

Filmo en Esperanto

La firmo Gevaert eldonis kolorfilmon 35 kaj 16 mm. pri la fabrikado de filmoruloj. La filmo, esperantlingva, estas titolita « Ĉermo de lumo ».

Por pruntepreno de la filmo, skribi al : N.V. Gevaert, Fotoprodukten, Dients Publiciteit, Sepstraat, Mortsel, Belgujo.

Svisa Poŝtstampilo reklamas esperanton

La svisa poŝtadministracio uzas en la jubilea jaro 62 specialan stampilon por senvorlogi pri poŝtmarkojn. La stampilo enhavas portreton de Dro Zamenhof kaj jenan tekston : « 75 jare internaciale sprache esperanto ».

Pri la ĉefprojekto « Oriento-Okcidento » de UNESKO

En konformiteco kun la ĉefprojekto « Oriento-Okcidento » de UNESKO, la esperanto-klubo de Angers daŭrigas sian serion de vesperoj pri aziaj kaj orientaj popoloj. La lastaj temis pri Hindujo kaj Japanujo. La programoj entenas : legadon de tekstoj en esperanto, ekspozicio en la ĉambrego, aŭskultadon de tipa muziko, projekcion de filmoj aŭ diapozitivaj.

La grupo aliĝis al la franca federacio de UNESKO-kluboj.

En Hispanujo

La hispana esperanto-junerala sekcio organizas ekskursojn, kaj, en Madrido, funkcias korbopilkluda grupo kiu jam komencis ludi kontraŭ aliaj ludantaroj.

En Aŭstralio

La aŭstraliaj esperantistoj aĉetis propran belan domon en Sydney.

Por la studentoj

Esperantaj studentoj, rilatu, se vi ne jam faris, kun la nova sekretario kasisito de « Stelo » (Studenta Tutmonda Esperantista Ligo) : Paul Ciliga, 56, rue d'Assas, Paris-6^e.

En Leningrado

Leningrada esperantista klubo funkcias ĉe Kulturpalaco de Klerigistoj (Mojka 94, Leningrado) kaj esperanta sekcio en la « Sciencista domo M. Gorkij » sub la gvidado de fama akademia sciencisto S.V. Obruĉev. Ekzistas ankaŭ junulara grupo « Aŭroro ».

VOJAĜO TRA PROVENCO

VI. - Aix-en-Provence

Mirinda aŭtovojo kondukas en mallonga tempo, de Marsejlo, la nuna ĉefurbo de Provenco, ĝis Aix, la antaŭa. Fakte, tiu provinca urbeto, kvietita kaj agrabla, estis dum longa tempo la ĉefurbo de la provenca regiono. Nur iom post iom ĝi perdis sian prestigon fare de konstanta kreskado de sia najbarino.

Kvankam la du urboj formas ekonomian kaj kulturen komplekson, Aix kontraŭstaras sian grandan rivalon per emociona kontrasto : natura kadro, klimato, agemo de siaj loĝantoj. Ĉia situacio meze de vastega ekonomia tuto devigas ĝin disvolvi siajn funkciojn de administra, lerneja kaj kultura centro. Aluminoj, karboj kaj cemento de baseno Gardano, hidrokarbidoj, kemiaj industrio kaj agrokulturo de Malalta Duranco, centro de multaj studadoj en Cadarache troviĝas apud Aix. La naturo borderis per dezertoj tiun zonan kun forta homa denseco : harmoniaj dezertoj de la montoj, aŭ krutaj reliefoj radiantaj de malproksimaj vastaj frangoj de soleco kaj silento, kiuj protektas la personecon de ĉiuj homaj grupoj.

Longatempe antaŭ la pasado de la unuaj romiaj legioj, la regiono havis loĝantoj : onidomo Entremont tion pruvas. Ĝi estis jam la ĉefurbo de la konfederacio Kelto-Beura. La termofonto haltigis la romiajn legiojn de Sextius Calvinus. Li establis sian fortikan tendaron en 123 antaŭ Kristo. Aix estis fondita. Kelkajn jarojn poste, en 102 antaŭ Kristo, la famekonata generalo Marius post sia frakasa venko kontraŭ Cimbroj kaj Teutonoj, pibeligis la urbon. Riĉaj monumentoj, belaj akvoduktoj starigas tie ĉi kaj tie. Ili ornamas la urbon. Longatempe antaŭ la triumfo de Arleso ĝi fariĝis la ĉefurbo de Narbona Gallujo. Ve, ĉiuj sinsekvaj invadoj de Provenco

lasis siajn spurojn en Aix, kiel ĉie aliloke, cetere. Nova invadanto aperis ĉiujarcente : Burgondoj kaj Visigotoj en la kvina, Lombardoj en la sesa, Saracenoj en la jaro 735a. Kvankam ĝi dependis de Arleso, en la epoko de ties reĝlando, ĝi denove fariĝis ĉefurbo : la ĉefurbo de la potenco Grafo de Provenco. Ĉiaj mastroj, Grafoj de Anjoo venas por restadi, kaj, inter ili, la plej populara, la lasta : Reĝo Renato. La urbo prosperas, pliriĉiĝas, plifortiĝas. Sed... Provenco estas aneksata de Francujo, perŝita laboro de Ludoviko la Dekunua. Li devigas sian onklon, la bonan reĝon Renato, herediĝi ĝin al li, per testamento. Ludoviko la dekunua mortas tri jarojn antaŭ la onklo sen la plezuro ĝui pri tiu nova pligrandigo de sia reĝlando.

La novaj reĝoj kreas Parlamenton, kiu, tamen, baltas ofte kontraŭ la centra potenco, precipe sub Richelieu kaj Mazarin. Iom da tempo antaŭ Franca Revolucio, Provenco estas definitive arigata al Franca Reĝlando : por tian celon atingi, tri jarcantoj estis necesaj. Aix estas tiam provinca urbeto. Nun ĝi konservas ankoraŭ sian apelaĉian kortumon, sian famekonatan universitaton pri juro kaj literaturo. La urbo estas nun tribunala centro, tre agema. Ĝi estas de longa tempo rendezuo de artistoj kaj la patrujo de pluraj famkonataj homoj : Mirabeau, la energia, elokventa, potenca oratoro, deputito de la Tria klaso al la komuna kunveno de 1789 ; Paul Cézanne kiu sidis apud Emile Zola sur la benkoj de la liceo en Aix.

Nun, ĝi fariĝas internacia kultura centro. Tial ĝi turmentigas kiel en ĉiuj epokoj de sia historio pro la revoj kaj la mizaĝoj de urbo sen ekonomia energio kun parada vivo de ĉefurbo.



De 1948 ekzistas la arta Mu- zika Festivalo, kiu daŭris tiam dek tagojn kaj hodiaŭ dudek- sep. Ĝi vivigas la tutan mona- ton julio, fariginta la « Aix'a Monato ». La ĉefaj prezentoj okazas en la arkiepiskopejo, be- la konstruaĵo de la fino de la deksepa jarcento kaj aliras cen- tojn da vizitantoj, amatoroj pri belkanto.

Kiel en Arleso, ni ne iros per aŭtomobilo por vivi tiun ur- bon kun malnovaj stratoj ofte mezepokaj. Ni garagos en la ĉirkaŭaĵo de la monumenta fon- tano. Se ni havos la tempon, ni faros la plej bonan viziton ga- pante. Por ke ĝi estu vere bona, imagu vivi antaŭ du jarcentoj. Ni renkontas, laŭ hazardo de la promenado ĉu belan luksan do- mon de riĉa nobelulo, kun tre belaj kariatidoj, ĉu fonto spru- cigantan varman akvon kies ŝpa- mo estas monda, ĉu elegantajn preĝejojn.

Se la tempo bedaŭre ŝiras por ni, tiam, ni iru ĝis korso Mirabeau kun ĝiaj kvar belaj ŝi- nioj de imponaj platanaj kaj multaj malnovaj domoj. Laŭ- longe, ni renkontos la fonton kun ĝiaj naŭ defluiloj. Varna estas la akvo, ĝis tridek kvar gradoj, jam famkonata en la ro- mia epoko.

Ĉe la fino de la korso staras la statuo de Reĝo Renato, la re- ĝo la plej amata en Provenco.

Maldekstre de tiu lasta monu- mento tra la strato Thiers, ni alvenos al Justiplaco. Tie mem staris la Malnova Palaco de Grafo de Provenco. Antaŭ ĝi entendiĝas placo de la Do- minikanoj (= des Prêcheurs) kun la samnoma fontano, de la XVIIIa jarcento.

Tra pentrindaj stratetoj oni atingas la belfridon (1501a) su- per pordego de la aktiva grata urbo. Kaĝo el forĝita fero ĝin superstaras, ŝirmanta malno- van sonorilon, kiu servas an- koraŭ nun kiel alarmilo.

Biblioteko Méjanes meritas viziton. Ĝi entenas pli ol 300.000 volumojn inter kiuj 400 inku- nabloj kaj multaj manuskriptoj. La bindaĵoj estas ofte tre belaj. Apude, la katedralo prezentas belan fasadon kun pordego or- namita de volbiĝoj kun elciĝi- taj foliaroj, kerubaj kapoj, ŝta- tuoj de patriarkoj kaj profetoj. Eniru, petu la sakristan mon- tri en la gotika navo la fame- konatan triptikon : Arda Ve- pro (le buisson ardent), tiu ve- pro, kiu, laŭ la Biblio, brulas restante verda !

Apude, la termobanejo elfluigas 1.500.000 litrojn de tridekkvargrada akvo, ĉiutage, posedas olimpikan nage- jon. Tie jam situis la antikva romia termobanejo de Sex- tius. La vizito finiĝas ĉe la monumenta fontano.

Ni realtiĝas por viziti la ĉirkaŭantan kamparon. Ni certe diros, kiel Josef d'Arbaud :

« La granda belajo de Aix estas la pejzaĝo... Ĝi mon- triĝas perfekta kaj pura. Nenio senorda, nenio ŝoka, ne- nia akreco kaj ĉinia moleco sur tiuj deklivaĵoj, kiuj, leviĝas ĝis la luno per nervaj kaj mildaj fleksoj : fron- tono de la montaro, stelo kaj sankta groto, Olimpo de Trets, kaj vi, koro de la Aix'a kamparo, templo kaj al- taro, cerbo kaj roko, Sainte-Victoire. Travidebla, vigla



dum aŭroro, ardita dum subiranta suno aŭ antaŭdiranta la fulmotondron per sia ĉapelo el nebulo, ĝi estas kiel videbla animo, vivanta vizaĝo kie speguligas la nuancoj de la vetero kaj de la sezono. Ĝia prezenco kreas, en la pejzaĝo, veran sorokanton. La okulo ekzaltiĝas kaj kvie- tiĝas : kiam, ĉe vojkurbigo, sur ondanta tereno el argilo kaj griza verdaĵo, Sainte-Victoire ekaperas tra la bran- ĉoj de granda pino, fiera melankolio, bridita heroeo, ŝaj- nas deveni de sia elementa forto. Ĝi eksplikas la medita- don de Vauvenargues, la elokvencon de Mirabeau, la arton de Cézanne, la lirismen de Joachim Gasquet.

GARRIGUE.

KELKAJ MINUTOJ KUN DOKTORO P. NEERGAARD

La nomo de Dro Neergaard estas sufiĉe konata en la Esperantista Mondo. Plantpatologo, li estas sekiestro ĉe la ŝtata Plantprotektista Servo en Kopenhago, kaj fariĝis en 1956 prezidanto de la permanenta plantpatologia komitato de la Internacia Semkontrolo Asocio. Antaŭ du jaroj li estis profesoro pri plantpatologio kaj semteknologio ĉe la Amerika Universitato de Beirut (Libano).

Ĝis 1957 li estis konata de la Esperantistoj dank'al sciencaj kaj esperantologiaj verkoj: Fremd-vortoj en Esperanto (1933), Scienco kaj pseŭdo scienco pri heredo kaj raso (1937), Terminaro hortikultura seslingva (1938), Tra densa mallumo (1942), Eta Krestomatio (1944), Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj (1954). Dumtempe, post la milito, li fariĝis ĉefredaktoro ankaŭ de « Sciencaj Studoj », volumo de originalaj sciencaj traktatoj. En 1957 li eniris la aron de la esperantaj novelistoj per sia « Vivo de la Plantoj », ĉar tiu scienca verko estas vera, interesege rakonto.

Dro Neergaard konsentis respondi kelkajn demandojn, Ni, pro lia afableco, multe dankas lin.

— 0 —

Via fako, plantpatologio, estas tute speciala. La scienculoj pli kaj pli specialigas. Sed vi « trovis » duan specialigon, esperantologion. Kiamaniere?

Se oni estas mordita de iu freneza demono de esploro, ne tiel gravas la objekto de la amo! Ĉu karotoj, ĉu iuj parazitfungoj, bananmuŝoj aŭ fremd-vortoj en Esperanto! Jam de mia frua junaĝo mi havis ian nerezisteblan emon al scienca esplorado, kaj same mi havis ĝeneralan intereson pri lingvoj, kvankam neniam mi amikiĝis kun la germana gramatiko. Mi esperantistiĝis en oktobro 1924 kaj baldaŭ mi ekinteresiĝis pri la lingvistiko de Esperanto, la majesta simpleco de la sistemo. Forte impresis min la studoj de René de Saussure pri vorifarado kaj tiuj de Eugen Wüster pri vortenkonduko en la unua parto de la Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana, tiu fama torso de la esperantologio. Kun kuraĝo de freŝbakiteco mi kandidatiĝis por la grado de *Scienca Kapableco* ĉe la alte respektita Esperanto-Instituto por la Germana Regno, en Leipzig, per du laboraĵoj. Terminaro Hortikultura Seslingva (tiam nur kvinlingva), kiu aperis en 1938, kaj unu studeto pri afiksoj en Esperanto. La unua estis akceptita, dum la dua, ho ve, estis rifuzita kiel ne sufiĉe profunda. Tiu rifuzo ne restis sen efiko, ĝi utile spronis min al plua kaj pli serioza studado, kaj sekve mi ellaboris mian Fremd-vortoj en Esperanto, kiun oni akceptis, kaj per tio mi akiris en 1931 la aspirantan diplomon de Scienca Kapableco. Fremd-vortoj en Esperanto aperis en 1933 kiel mia debutajo. Multe kuraĝigis min precipe la laŭdaj recenzoj de la du grandaj kanonoj, profesoro Grosjean-Maupin, nia gvida leksikologo, kaj Dro Kalocsay.

Ĉu viaj plej gravaj verkoj aperis en Esperanto aŭ en nacia lingvo?

Estas iom malfacile taksu la « gravecon » de siaj propraj verkoj. Miaj libroj estas verkitaĵoj por tre diversaj medioj kaj sekve ilia signifo varias laŭ tiuj medioj. Miaj mikologiaj-plantpatologiaj ĉefverkoj, bazitaĵoj sur originalaj esploroj, aperis en la angla lingvo, nur relative malmultaj en nia gepatra lingvo, la dana. La plej ampleksa estas monografio 562-paĝa (cetere kun resumo en Esperanto). Mi daŭre ĉefe verkas la studaĵojn de mia fako en la angla lingvo, tiel ekz. mi hodiaŭ havas kvin tiajn en preso. El miaj popularsciencaj libroj La Vivo de la Plantoj estas, mi tion konfesas, mia korinfano (mi inkludas kun ĝi ĝian danan paralelon). Ellaborante ĝin mi klopodadis viviĝi la grandiozecon de la naturreĝo, kiuj regas en la planta mondo, ĉar mi volis turni min al tiuj milionombraj homoj, kiuj « ne interesiĝas pri botaniko », vere ĉar ĉia simpatio al la silenta planta mondo estis zorge detruita per la mallerta, sterila instrumaniero por tiu fako en multegaj lernejoj (tiu nombro de petaloj, vi scias!). Tiel mi mem spertis; en la lernejo botaniko estis la al mi plej enuiga fako! Do mia tasko estis, kiel evitiĝi al tiaj similajn suferojn. Dum la verkado de la libro en la dana lingvo mi ŝanĝadis kaj reŝanĝadis oftege, kelkaj partoj de la libro estas reverkita ĝis 8 fojoj, ĝis mi trovis la prezentmanieron akceptinda... Miaj fakaj libroj en Esperanto, ekzemple « Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj », ja celas plenumi du taskojn, unue doni fidindajn fakajn informoj precipe al legantoj en tiuj landoj, en kiuj ne ekzistas samampleksaj informiloj, due formi la bazan lingvaĵon de diversaj fakoj i.a. de plantpatologio kaj aplikata entomologio, lingvaĵo, kiu apartenas al la ĉiutaga vivo ne nur de ĉiuj fakaj hortikulturistoj, sed ankaŭ de la granda verfigra armeo de la ĝardenamantoj.

Ĉu vi opinias, ke estas necese eldoni pli kaj pli da sciencaj verkoj en Esperanto?

Komprenble. Eldonado de tiaj verkoj estas la antaŭkondiĉo por ĝia praktika aplikado en la scienco. La unuajn paŝojn devas fari la sciencistaj esperantistoj per eldonado de bazaj libroj, unuavice popularaj aŭ duonpopularaj destinitaj por vasta uzado ĉe la ĝenerala publiko, duavice per aperigado de sciencaj traktatoj destinitaj por sciencaj kolegoj. Esperantistoj terminaroj estas bonegaj kaj nepre necesaj, sed — kiel mi plurfoje aŭloke emfazis — ili plej ofte estas nur fakaj lingvoprojektoj. Nur kiam oni uzas la fakajn lingvon praktike, la terminoj akiras siajn civitanajn rajtojn en la lingvo, ili elvivas. Vere, ni devas insisti, ke niaj bonaj specialistoj verku librojn el sia fako. Tiaj libroj prefere ne estu tro specialaj nek tro sekaj, kaj estas grave, ke ili, laŭeble, estu bone ilustritaj. La esperantistoj volonte aĉetas tiajn librojn, precipe se ili estas tipografie belaj, ĉar tiaj seriozaj eldonaĵoj atestas pri la ĉiufanakeco de la internacia lingvo. La faka libro en Esperanto estas, kompare al la beletra, ankoraŭ mizere nesufiĉe pri-zorgata, ni devas konstati, ke nia literaturo tute ne estas en ekvilibro tiurilate.

Cu ne estus ege interese aperigi en la internacia lingvo sciencajn verkojn sufiĉe valorajn por instigi al tradukado en naciajn lingvojn?

Estas tute klare, ke oni eldonu el Esperanto verkojn nepre unuarangajn. Se libroj en Esperanto akceptigas por naciaj lingvoj, tio estas la plej bona atesto pri la bona kvalito de nia literaturo, kaj jam ekzistas ja multaj ekzemploj pri nacilingvaj tradukaĵoj el Esperanto. La esperantistoj, kiuj tradukas nacilingven el nia literaturo, faras vere gravegan servon al la prestiĝo de nia movado kaj literaturo.

En artikolo aperinta en la lasta numero de « Kulturaj Kajer » , Sro Ingeniero Watter skribis, ke Esperanto venu « praktike en konkurado kun la plej uzataj lingvoj ». Kion vi pensas pri tiu aserto? Cu tia konkurado estas ebla?

Se oni observas la uzatecon de la naciaj lingvoj en la internacia komunikado, oni konstatas, ke nur nemultaj naciaj lingvoj ludas elstaran rolon kiel internaciaj helpilingvoj : angla, franca, germana, rusa, hispana, itala, al kiuj krome aldonigas la latina en certaj fakaj ekleziaj medioj. Iuj « grandaj » naciaj lingvoj kiel la ĉina, araba, estas pli regione ol internacie uzataj. El vidpunkto de internacia uzado, Esperanto fariĝis konkurenca-kapabla. Por kompari, vidu, kiel novaĵo, kiel Interlingva, per entreprenemo kaj lerta koncentriĝo por efektiviĝi specifikaĵajn praktikajn traduktaskojn sukcesas enigi en certajn scienclistajn mediojn, en kiuj tiu lingvoprojekto vekis ian atenton kiel pontlingvo — rolo por kiu Esperanto estas multe pli taŭga pro ĝiaj kvalitoj por aktiva aplikado. Esperanto estas ankoraŭ juna lingvo, sed atingis tiaman maturecon, ke finfine estas afero de bone direktata organizado, ĉu nia lingvo montriĝos konkurenca-kapabla en la internacia komunikado aŭ ne. La eblaj ekzistas, se ni scias eluzi ilin.

Oni ofte aŭdas nun, ke, kvankam oni kutime diras « Unueco estas Forteco », ĝi ankaŭ povas esti malforto pro tio ke por eniti « disigon » oni estas devigata preterentii multajn problemojn de nia tempo, kiuj postulas « elekton ». Kion vi pensas pri tio?

Mi ne klare komprenas vian demandon. Sed se vi per « elekto » celas sintenon al la diverseco de tendencoj ekz., en la politika vivo (nia sinteno al la atombombo, ekzemple), mi volas respondi, ke la karakteriza specialigado de la Esperanto-movado estas perfekta solvo pri tiu problemeco de « elekto ». Krom diversaj fakaj organizaĵoj ni havas diversajn religiajn (protestanta, katolika kvakera, Oomoto, budhana k.a.) kaj politikajn (SAT, pacmovado de la orient-blokaĵ landoj, la mondfederacia movado k.a.). Ĉiu laboru laŭ siaj intereso kaj por siaj idealoj, kaj en la sana atmosfero de toleremo kaj komprenemo, kiun ĝenerale oni trovas en la Esperanto-movado, tiuj diversaj tendencoj kaj politikaj-filozofiaj skoloj pace interluktas kaj konkurencas laŭ la principoj de demokrateco. Estas neneglektable, ke tiu multflankeco de la aktivecoj en nia movado funkcias kiel bela edukeyo por demokratia pens-kaj agmaniero kaj kiel tia havas kromvaloron gravegan flankon de la valoroj pure lingvaj-teknikaj de Esperanto. Mi kredas, ke la samtempe centriga kaj decentriga organizado de la Esperanto-movado loke, lande kaj internacie en komunaj kaj specifikaj specialigintaj organizaĵoj estas nia plej bona gardado kontraŭ unuflankeco.

Cu vi intencas publikigi novajn verkojn? Kiaspekajn?

Parolante nur pri esperantaj verkoj, mi promesis al Régulo Pérez, Esecaron, kiu pritraktos cefe temojn ekster mia fako la esperantologio. Ĝi parte baziĝas sur prelegoj, kiujn mi faris en la dana radio. Se montriĝos eblaj, kiuj je la momento ne ekzistas, mi ŝatus repreni la temon pritraktitan en mia debuta libro, Fremdvojtoj en Esperanto, kaj fari monografion pri la leksikologio de Esperanto, t. e. ĝenerala pritrakto de vortenkundoko el vidpunktoj de la faka kaj de la ĝenerala (komuna) lingvo, temo tre grava por la evoluo de Esperanto. Espereble la esperantista publiko ankaŭ permesos per sia pozitiva sinteno, ke ni post ne tro multaj jaroj povu eldoni duan volumon de Sciencaj Studoj (alvenis 2-300 antaŭmendoj), sed ankoraŭ ni bezonas vendi pli da ekzempleroj de la unua volumo por likvidi la restuldon al la presisto. La ĝenerala publiko povas efike subteni niajn klopodojn sukcesigi la lingvon en scienclistaj medioj, se ili abonas kaj aĉetas publikigaĵojn kiel Sciencaj Studoj Esperantologio, Scienca Revuo, k.s.

Vi longtempe loĝis en Libano. Kiujn ŝancojn havas Esperanto disvastiĝi en Proksima Oriento?

En Proksima Oriento Esperanto havas la samajn ŝancojn kiel en la ceteraj partoj de la mondo. Se troviĝas iniciatemaĵ gvidantoj, movadoj povas ekflori. En Libano fariĝis bona komenco. Kun la kreskanta internacia trafiko kaj cetera komunikado la disvolvigo de la Esperanto-movado en la Proksima Oriento kaj en aliaj aziaj kaj afrikaj landoj estas nepre necesa, kaj en la venontaj jaroj de forta stabiligo de la sendependeco de deknoj da novaj ŝtatoj, la bezono por rektaj kontaktoj kaj por lingva liberigo de la antaŭaj koloniaj potencoj diktas tian disvolvigon ĝuste en tiuj landoj.

Mi finas per tute persona demando. Kiam mi la unuan fojon renkontis vin okaze de Florekspozicio en Nantes, vi montris al mi vian pasporton kaj mi povis konstati, ke via tuta nomo estas parte francdevena. Cu vi faris geneologiajn esplorojn por klarigi tion?

Kiel surprizan memorkapablon vi havas! La impona vico de miaj francaj antaŭnomoj, Pierre Paul Ferdinand Mourier (mia familia nomo estas de Neergaard) vere baziĝas sur la nomo de unu el miaj prapatroj, kiu portis la saman pompan nomaron kun Mourier kiel familia nomo. Oni bonvolas diri en mia familio, ke en pluraj rilatoj mi similas al tiu homorinda dignulo, kiu vivis antaŭ 150-200 jaroj. Li multe vojaĝadis, eĉ al la Ekstrema Oriento, kaj li havis fortan intereson pri lingvoj. Li estis vera internaciulo de sia tempo, kaj eĉ al lia karaktero ne mankis ŝatinde granda toleremo, kiun ne sukcesis pereigi lia sennombra adoptita kaj propra infanaro, kiu persiste bruidis en lia domo. Do ne malbona modelo al malfrua nepo (kun kvar infanoj). Lia deveno kaj la franca sonoreco de miaj antaŭnomoj atestas ian sangon kaj spiritan ligitecon al la aminda franca popolo! Evidentiĝas, kiel mi trovis tiom da amikoj ĝuste en tiu verva, artisma kaj homecogento! La impeto de la francaj sangogutoj (iom diluitaj, sed des pli bolantaj) en miaj delikataj, bluaj, nordaj, nobelaj vejnoj! La mistero de l'psango! Sekve do, ĝis pluaj translandlimaj amikiĝoj!

P. BABIN.

NE KREDEBLA MALKOVRO

«La Venusaj pordoj»

Je alteco 4.000 metra en la Andoj : la lago Titicaca. Oni pensas — sed ne ĉiuj geologoj samopiniias pri la dato — ke, iam, ĝi estis mara golfo, kiun suprenlevis giganta kataklismo. Tion atestas ruinaĵoj de haveno, restaĵoj de algoj kaj konkajĵoj sur la bordoj, kaj ciklopaj ruinaĵoj de konstruaĵoj, kies transportado al tiom alta loko estas malfacile imagebla.

El tiuj ruinaĵoj « La Pordoj de la Suno », ege rimarkindaj, konstruitaj eble antaŭ 12 aŭ 15.000 jaroj, staras, tute izolitaj, en la templo de Kalassasava. Ili estas kovritaj je hieroglifoj prezentantaj kalendaron tre strangan sed tre precizan, certe la plej malnovan sur la tuta tero, oni opinias, sed, kiun neniuj kapablis klarigi. Temas pri granda ciklo (unuĵara oni opinias) konsistanta el 290 tagoj, dividitaj en 12 partojn, kiujn oni opiniis « monatoj », 10 de 24 tagoj, 2 de 25 tagoj. Sed la rapido de nia tero, en tiu tempo, ĉirkaŭ sia akso estis proksimume la sama kiel nuntempe. Do ? Ĉu tiu kalendaro rilatis nekonatan planedon ? La Akademio pri Sciencoj de USSR poste publikigis sensacian komunikadon pri la elektro-magneta detekto de Venuso kaj aperis ankaŭ artikolo de Profesoroj Kotelnikov kaj Chklaski. Ni nun scias ke la rotacioperiodo de Venuso estas proksimume de 9 teraj


tagoj. Sed la Venusa jaro egalas 225 terajn tagojn. Tio signifas, ke la Venusa jaro konsistas el... 24 tagoj. Do, ĉu la malgranda ciklo ne prezentus jaron anstataŭ monaton ? La nombro de la tagoj en unu jaro ne estas entjera. Ni havas superjarojn. Se la 290 tagoj precize konsistigus ciklon 12 jaran, kun dek 24 tagaj jaroj kaj du 25 tagaj jaroj, tio koincidus kun la kalendaro de la « Pordoj de la Suno » ! Se nur koincido, ĝi tamen estas miriga ! Kompreneble oni povas nenion certigi ! Sed oni povas fari al si la demandon : kiamaniere la antikvuloj konis la venusajn kalendaron ? La lago Titicaca estis la naskejo de la antikva civilizo de la Inkaoj. La hispanaj konkerantoj kiuj ilin submetis, rakontis ke la Inkaoj estis ege civilizitaj, konis la feron kaj multajn bronzaĵojn kunfandaĵojn, kaj oni rajtas supozi, ke ili havis « altfornojn ». Do, kion pensi pri la legendo pri la « blank-haŭtaj, bluokulaj, barbohavaĵoj » alilandanoj, kiuj organizis la antikvan Inkanan ŝtaton ? Kompreneble ni ne rajtas konkludi. Proksimiĝas la tago kiam niaj kosmonavigantoj malkovros misterplanan mondon, kiam ili flugos al Venuso... Dumtempe ĉu ni ne povus nomi la « Pordojn de la Suno », « Pordoj de Venuso » ?

(El « Planète »).




Kiam la infanoj ludas la plenkreskulojn !


La tri vizagôj de la pasagersipo "France"



La unua « France » estis 108 metrojn longa. Ĝi ekservis en 1864. Ĝi estis plilongigita je 12 metroj en 1874. Ĝi estis dupla delrada dumastulo.



La dua « France » estis 218 metrojn longa. Ĝi ekservis en 1912, estis rekviziita dum la unua mondmilito.



La tria « France », kiu, la unuan fojon transiris la Atlantikan Oceanon antaŭ kelkaj semajnoj estas la plej granda pasagersipo en la mondo. Vera palaco ĝi veturigas 3500 personojn.

EL IE EN LA MONDO

MILITO KONTRAŬ ANALFABETECO



Kubo estas la plej granda insulo en la insularo troviĝanta inter la du Amerikoj. Dum jardekoj, Kubo estis tre famkonata tutmonde pro sia tabako kaj sukero, kaj nenio plie...! Sed depost la unua tago de la jaro mil naŭcent kvindek naŭ, Kubo atingis la unuan lokon el la plej interesaj novaĵoj, ĉar en tia dato komenciĝis grava revolucio tie. Dirate per multaj vortoj, Kubo fariĝis la lando, kies nomo troviĝas ĉe ĉies buŝoj. Kaj tion ĉi oni povas esprimi sen ia malmodesto, ĉar ĝi estas konstatebla per la diversaj komentoj de esperantistoj ĉiulandaj, en iliaj leteroj sendataj kune kun eltranĉaĵoj de naciilingvaj ĵurnaloj menciintaj Kubon kaj ties revolucion.

La plej grava bazo por la kultura plibonigo de la kuba popolo estis atingata dum la pasinta 1961, ĝi estis nomata Edukaro, kaj tiun nomon oni skribadis apud dato en ĉiaj oficialaj dokumentoj. La ĉefa celo en la programo de la kuba revolucio estis finiĝi analfabecon en la popolo, dum la jaro 1961. Tia tasko ja ne estis iel malfacila kiel eble aspektus, ĉar en Kubo ĉiuj enloĝantoj parolas hispane kiel naciilingvon.

En Kubo ne troviĝas naciiminoritatoj parolantaj ian fremdan lingvon, kiel okazas en aliaj landoj de Eŭropo kaj Azio. Blankaj kubanoj devenas el hispanoj konkerintaj kubon en pasintaj jarcentoj, kaj Kubo restis, kiel lasta hispana kolonio, kune kune Portoriko, ĝis 1898. Triono da enloĝantoj de Kubo estas « kolorento », t.e., negroj kaj duonnegroj. Tiaj negroj estas idoj de afrikanoj alportitaj de hispanoj kiel sklavoj dum koloniaj tempoj; kaj pro miksiĝo de blankuloj kaj negroj ekestis mulatoj, aŭ duonnegroj. Afrikaj lingvoj estas forgesitaj en Kubo de antaŭ pluraj generacioj. Indianoj ne loĝas en Kubo, ĉar ili pereis dum la unuaj jaroj de la hispana konkero, kaj nur en kelkaj nomoj de lokoj kaj aĵoj restas iuj vortoj de ilia mortinta lingvo.

En la fino de la jaro 1960, la revolucia registaro de Kubo sciiĝis, per buŝo de ĉefministro Fidel Kastro, la celon, ke dum la sekvonta 1961 estus la fina batalo kontraŭ analfabeteco. Kaj li esprimis esperon, ke ankaŭ en tiu sama dato de la tiama venonta jaro Kubo estus nomata « Teritorio Libera je Analfabeteco ». Tiam naskiĝis nova vorto por nomi ĉi tiun kulturan agadon, kio estas tradukebla en Esperanto per « alfabetumi », t.e., instrui legi kaj skribi. Taj komencis labori tre diligente kubaj aŭtoritatoj plenumante planon por la tutjara kampanjo. Geinstruistoj ne estis sufiĉaj, kaj do oni organizis la Armeon de Alfabetumistoj, al kio aniĝis ĉiuj kleraj civitanoj volantaj instrui.

gejunuloj, kaj ili aniĝis en la Brigadoj « Conrado Benitez » (Konrado Benites). La nomo Conrado Benitez estis pro juna negro, kiu jam en Januaro 1961 komencis alfabetumi en la kamparo. Dum tiuj unuaj monatoj la kontraŭrevolucio estis ankoraŭ tre forta interne de Kubo, kaj tial grupo da malamikoj kapitis lin kaj pendumis lin ĉe arbo. La tuta Kubo indignis pro tia krimo, kaj Fidel Kastro en sia parolado pri tio deklaris: « Li daŭrigos sian instruatan taskon ». Kaj tiamaniere ekvivis la Brigadoj « Conrado Benitez », la plej simpatia kaj ĉarma flanko en la kuba Edukaro de 1961. Ili sumiĝis proksimume pli ol cent mil gejunuloj.

La misio de brigadanoj « Conrado Benitez » estis alfabetumi en la kamparo kaj vilaĝoj, per speciala kaj oficiala lernolibro titolita « Venceremos » (« Ni Venkos »). Ili ĉiuj estis trejnataj dum pluraj tagoj en belega stranda banloko, po grupoj de centoj da gejunuloj. Ili uniformo estis oliv-verda, kaj donila de la registaro. Inaj brigadanoj ankaŭ surmetis pantalonon kaj botojn. Dum la tuta instrua tempo ĉiu brigadano(in)o devis kunloĝi kun kamparana familio, kaj helpi al ili je laboroj ĉiutagaj. Kiel helpilo por klasoj dum noktoj, ankaŭ la registaro donis al ĉiu brigadano(in)o egan kerosen-lanternon faritan en Ĉinio. Je la fino de la tasko, post instruado en sia loko, ĉiu juna alfabetumisto revenis urbojn. Ĉiuj lanternoj restis kiel donacoj, en la kamparanaj domoj, kie gastis alfabetumistoj.

La kampanjo por alfabetumi en Kubo disvolvigis tra la tuta Edukaro, per intensa kaj aktiva propagando, ĉe gazetoj, ĵurnaloj, radio, televido kaj aĵoj. Kiam la lasta analfabeto instruebla estis jam alfabetumata ie, tian lokon oni deklaris kiel « Teritorio Libera je Analfabeteco ». Kaj tiel, iom post iom, farmoj, kooperativoj, fabrikoj, kvartaloj, vilaĝoj, urboj, provincoj hisis la ruĝan flagon kun la surskribo kiel « teritorio libera ». Fine, la 22an de Decembro 1961, Fidel Kastro mem, en la ĉefurbo Havano, kaj antaŭ multenombra homamaso, solezane deklaris Kubon: « Teritorio Libera je Analfabeteco » en Latinameriko.

Raúl Juarez SEDENO.

Camagüey, Kubo.

La plejparto de la Armeo de Alfabetumistoj estis

FANTAZIAJOJ

La fabeleto estas tradukita el la hungara ĵurnalo «Esti Budapest».

LA VALORO DE UNU GROSO

(ORIENTA FABELO)

„Vivis iam en Oriento riĉa homo, kiu havis du filojn. Li sentis proksimiĝi lia morto, sed li ne volis morti antaŭ ol li elektas, kiu estas el la du filoj inda por heredi la abundon kaj la havaĵon.

Li do alvokis la du filojn kaj alparolis ilin :

« Antaŭ ol mi mortos, mi dezirus scii, kiu estas el vi la pli lerta, la pli saĝa kaj la pli profunda. Jen por ĉiuj po unu kupro-groso. Iru en la urbon kaj kiu el vi hejmenportas por tiu grosso pli grandan valoron, tiam, kia tiun ĉi domon, kie vi naskiĝis, pli multe plenisas, ties estu la potenco kaj la havaĵo. Ekiru! ». Tion diris la patro kaj donante po unu grosso al ambaŭ filoj, adiaŭis de ili, kiuj plenzorge eliris al la urbo, post kiam ili kisis sian patron. La unua filo — kompreneble la pli aĝa — pasigis multan tempon sur diversaj lokoj, li trairis ĉiujn vendejojn, magazenojn, bazarojn kaj foirojn, sed li trovis, ke ĉio estas tro kara, tro multekosta. Fine li decidis aĉeti paĵon por la kupro-groso, kion li ricevis de sia patro, ĉar inter la multaj multkostaj aĵoj tio estis la plej malmultekosta, el kiu oni povis aĉeti la plej multon por grosso. Do li iris hejmen kun la paĵo, sed verdire nur malgranda angulo pleniĝis de la domo per la paĵo, kiam li terenverŝis ĝin en unu ĉambro.

La alia — pli juna — filo ankaŭ vagadis dum longaj semajnoj de foiro al foiro, sed ankaŭ sen rezulto. Li vidis la multajn multkostajn vendotaĵojn — ĉio estis nepagebla per la sola eta kupro-groso. Tiel li iris pluen kaj pluen al novaj foiroj, el unu vilaĝo al alia, el unu urbo al alia, inter multaj penadoj kaj suferoj. Eĉ duonjaro pasis, ĝis fine li atingis la hejmon. Li portis pecon da kandelao, ĉar nur tion li povis aĉeti per la grosso.

Iom honte li eniris la domon, kaj estis ĝuste vespero, estis malhela kaj ankaŭ sufiĉe malvarma tiam, kio estis eĉ pli forte sentebla en la malhelo. Li ekulumis la kandeleton — kaj tiam la tuta domo pleniĝis kun lumo, kun helo, kun varmo, kun certeco kaj kun fido... kaj ĉe la lumo de la eta kandelao la homoj povis bone vidi unu la alian. Ili povis bone vidi kaj ili ekkomprenis, ke eble tio estas la plej multa, kion ni povas aĉeti por la kupro-groso, kion donis al ni komisie la naturo, en tiu ĉi malŝpare elŝpezanta, senutila mondo! Jes, tio estas la plej valora en la mondo : la lumo, kaj la helo, la interkompreno kaj la fido... Malgranda kandelao, se ĝi lumigas, valoras pli ol cent ornaĵoj, mil potencoj, bildoj kaj tapiŝoj, diamanto kaj oro. Eble tial, ĉar ĝuste el tio estas la plej malmulta en tiu ĉi mondo...

Jen la fabeleto, kion mi rakontis dum la kultur-vespero de la II-a Hungarlanda Esperanto kunveno en Budapeŝto kaj mi aldosis :

La aŭtoro uzis la fabeleton en kadro de rakonto, en kiu la homoj staris malamikie, nekomprene unu kontraŭ la alia, eĉ en la sama domo, en la sama familio, ĉar ili estis en mallumo. Jam eta lumo povas ŝanĝi la situacion, la rilatojn de la

homoj unu al la alia ! Ĝi forigas la miskomprenon, la malicon, la malamon, la militemon, ĝi kreas komprenon, amikecon, kunsenton, harmonion, pacon !

Tia kandelao, tia lumeto estis antaŭ jardekoj nia lingvo Esperanto ! Kaj nun ni spertas, ke ĝi helpas, lumigas, amikigas en la grandaj kongresoj kaj en la modestaj kunvenoj ! Ĝi ne plu estas kandelao, ĝi jam farligis torĉo !

Tenu ĝin firme kaj lumigu la mondon.

Zsigmond Ramenyik.
(trad. P. Balkanyi)

BONHUMORO EL LA HUNGARIA PASINTECO

(El kolekto de fama verkisto Mauro Jokai)

El malnova milita epoko.

Okaze la militado kun la turkoj, kiam ili atakis kaj okupis grandan parton de la lando, al la estro de la fortikaĵo Komaron sendis turke skribitan leteron la atakanta paŝao, postulante transdonon de la fortikaĵo al la turkoj. La militestro resendis la leteron. Tiam la paŝao sendis serban interpretiston, ke tiu klarigu la enhavon de lia postulo.

Reiru al via paŝao — diris la fortikaĵestro al la interpretisto — kaj diru al li, ke mi marĉandi komprenas nek turke, nek serbe, sed ni batalos hungare.

La civitana gvardio.

Dum la liberecbataloj oni fondis multloke civitanajn gvardiojn. En hungara urbo okazis, ke la gvardio iras parade kun fusiloj, flagoj. Ili venas el la urbdomo kaj iras al la preĝejo.

Antaŭ ili marŝas piede dika kapitano kun eltirita glavo kaj nenio povus instigi lin, ke li rerigardu al sia kompanio. Li nur komandas sen turnante sin.

La preĝejon oni povas atingi tra flanka strateto, sed la kapitano volas sian gvardion konduki tra la foirplaco, ke la popolo vidu ĝin.

Kiam ili atingas la flankan strateton, la tuta kompanio opinias, ke estas memkompreneble uzi la pli mallongan vojon kaj enturniĝas. Ili lasas la kapitanon marŝi sole pensante, ke li eble havas ian farotaĵon ĉe la foiro. Ili ja renkontiĝos ĉe la preĝejo.

La estro de la trupo do iras fiere kun eltirita glavo en la mezo de la placo kaj kiam tie oni devus turniĝi kaj li laŭte komandas : « Dekstren turnu vin ! » rimarkas embarasite, ke neniu iras post li. La bravaj civitanoj jam delonge staras ĉe la preĝejo kaj eĉ ripozis sufiĉe.

(Laŭ la hungara P. B.).

Le Gérant : H. MICARD

CERBUMU



1) LA RUZA ALI

La ĉevalisto de potencia sultano perdis la preferatan ĉevalinon de la mastro. Oni ne plu povas ĝin trovi. La malfeliĉa junulo venas antaŭ la monarkon kiŉ, laŭ la leĝoj, lin kondamnas je morto.

« Via Moŝto », humile petas la malfeliĉulo « konsentu, ke post tri tagoj mi denove venu antaŭ vin kaj diru nur unu frazon. Vi senkapikigos min se mi diris la veron. Vi pendigos min se mi diris malveron ».

La Sultano opiniis la demandon stranga sed respondis : « Kion vi petas, tion mi promesas ».

Ali, post tri tagoj, diris nur unu frazon kaj savis sian vivon. Kion li diris ?

Respondoj.


La sultano kompensis ke la junulo insidis lin kaj diris : « Iru, do ! Aliaĉo gardu vin ! ».

« Do, vi estos senkapigita » — « Alendu via Moŝto, se vi senkapigos min, diris malveron ĉar mi diris, ke mi estos pendigita ! ».

« Alendu, ĉu vi volas rompi vian promeson ? Se vi pendigos min, mi diris la veron. Se mi diris la veron, vi promestis, ke mi estos senkapigita ».

Ali diris nur : « Mi estos pendigita » — « Pri tio mi konsentas » respondis la sultano.

1) LA RUZA ALI



2) SUR LA SPORTEJO

Kiu povas kalkuli la nombron de la skiantoj, kiujn oni tute aŭ parte vidas sur la supra bildo ?

2) LA SPORTEJO

Estas 24 personoj.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (20 aŭst. ŝil.).

Belgujo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18.

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (6 ŝil.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (2,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (3 mark.).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, (16) KASSEL (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark.).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (40 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (450 liroj).

Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.

Jugoslavio : S-ro Lehotkay K. Ferenc, ul. Petefijeva 27, ZRENJANIN.

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rødes veg 56, LAMBERTSEDER (6 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K (6 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Złotoj).

Svedujo : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (4 kron.).

Svislando : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (3 sv. Frank.).

Usono : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (11 st.), aŭ respondkuponoj (8 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra cent-rokcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo